

# Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino

## JARŜANĜA CIRKULERO 2007-2008

Estimataj kaj karaj akademianoj,  
malfrue alvenas al vi ĉi tiu cirkulero. Kaŭzoj estas pluraj, sed ni rigardu la pozitivaĵojn de la pasinta jaro 2007.

Nia ĉefa evento estis la tradicia SUS, jam veninta al sia 30a renkontiĝo, eĉ esceptante la prov-SUSojn; ĝi okazis de la 2a ĝis la 8a de septembro en Rimini en la negrandaj, tamen disponeblaj ĝis malfruvespera horo, lokaloj de la Esperanto-Centro de Rimini – Justeca kaj Solidareca. Okazis ok kursoj de kvin sekcioj plus sep liberaj prelegoj, inkluzive unu debutprelegon kaj unu docentiĝan. La docentoj venis el Italio, Germanio, Aŭstrio, Bosnio kaj Hercegovino, Rumanio, Pollando. La findiploma kunsido havis ĉi-jare tre prestiĝan sidejon: salonon de la Ŝtata Muzeo de la Respubliko San Marino, kiu gastigis ankaŭ kunsidon de la nova Senato. Sep studentinoj el Pollando, Rumanio kaj Bulgario akiris diplomojn de bakalaŭreco, magistrecio kaj doktoreco. Dum la SUSo estis elektita la nova Senato, kiu deĵoros ĝis fino de 2011: OProf. F. Pennacchietti, prezidanto, OProf. C. Minnaja, vicprezidanto, OProf. R. Fössmeier, senata sekretario kaj informofico, OProf. B.-A. Wickström, trezoristo, OProf. H.-D. Quednau, klerigofico. Estis ankaŭ elektitaj ses vicsenatanoj. La iniciatinto de AIS kaj ĝia ĉefa motoro dum kvaronjarcento, OProf. Helmar Frank, estis, kun granda ovacio, nomumita Honora Prezidanto. Venonta SUS estos prov-SUS en Banja Luka, en la unua semajno de septembro 2008, organizota de EProf. Ljubiša Preradović.

Sed okazis ne nur la SUSo. De la 2a ĝis la 4a de marto estis Scienca Konferenco de AIS ĉe la Universitato de Sibiu, organizita de EProf. S. Konnerth, kun rumanlingva kaj esperantlingva sekcioj (Sibiu estis ĉefurbo de kulturo en 2007). Dum tiu konferenco okazis ankaŭ senatkunsido.

Post serioza kaj celkonscia preparado, en aprilo nia klerigejo Eŭropa Jurscienca Universitato “Justo” partoprenis kunvenon ĉe la Rusia Akademio pri Klerigado rilatantan al enkonduko de Esperanto en la lernejojn de Rusio; la kunveno finiĝis per favora rezolucio, sed tre verŝajne ĝi ne estos atentata de la koncerna rusia ministerio..

En la simpozio FIHUSO 2007, en majo, okazinta en Kaunas ĉe la Humanistika Fakultato de la universitato de Vilnius (LT), estis pluraj partoprenantoj de AIS, kiuj persone prezentis aŭ sendis valorajn kontribuojn; ISK-ano M. Cwik faris invititan ĉefprelegon en la inaŭgura mateno, C. Minnaja prezidis sekcion, Ascii. A. Cizikaite estis la plej granda kontribuinto al la organizo kaj al la sukceso de la simpozio.

La 92a Universala Kongreso de Esperanto en Yokohamo gastigis, kiel tradicie, AIS-kursojn, kies unua prelego estis IKU-prelego kaj jam nun estas anoncita riĉa IKU-programo kun AIS-kursoj por la 93a UK en Roterdamo en venonta somero.

Plifortiĝis la rilatoj kun ILEI, danke al ASci A. Cizikaite, kaj AIS sendis oficialan saluton al la ILEI-konferenco okazinta 12–19 aŭg. en Ranzan, Japanio.

Estis subskribita kunlaborkontrakto kun la Ŝtata Industria Universitato de Moskvo. Jam en 2006 tiu universitato estis eldoninta ILo-lingvan universitatan tekston pri historio de matematiko kaj tekniko, verkita de AIS-profesoroj

Estis sukcesa traktado kun la Universitato de Bydgoszcz por starigo ĉe ĝi de registro de AIS-diplomitoj. En Pollando okazis en 2007 kvin studadsesioj, tri en Bydgoszcz kaj du en Supra Silezio.

Denove AIS-anoj forte partoprenis en Scienca Konferenco en Banja Luka (BiH), kies organizo, kunlabore kun la Akademio de Sciencoj de la Srpska Respubliko, kaj modela eldono de la Aktoj (prese kaj viddiske) ŝuldiĝis al EProf. L. Preradović.

Formala negativaĵo estis la neokazo de la starto de la Libera Eŭropia Universitato Kelemantia de AIS (LEUKAIS) en Komarno pro la neakcepto de ĝia studprogramo fare de la Slovaka Ministerio. La Akademidomaro, kiu estis forte investinta en Komarno antaŭvide al tiea aktivigo de kunvenoj, kursoj kaj sciencaj eventoj, eble devos repensi pri la situacio.

Post longa paŭzo aperis du novaj kajeroj de Acta Sanmarinensia, unu de OProf. Sachs kaj unu de OProf. Kiselman; kiel kutime la tre interesa enhavo kongruas kun la eldonmodela ekstera aspekto. La Subtena Sektoro ankoraŭfoje mecenatis la prestiĝan eldonon. La revuo vere meritis relanĉon al pli vasta merkato

Kun kora saluto al ĉiuj AIS-anoj kaj kun bondeziroj pri prospera agado cele al pliaj sukcesoj.

Carlo Minnaja  
Vicprezidanto